
# *Kubo kaj Nikaragvo plifortigas kunlaboron pri trejni?o de siaj armitaj fortoj*




Havano, jun 11 (RHK) "Mi volas danki niajn kubajn fratojn kaj fratinojn pro la invito al ?i tiu, nia dua patrujo; multaj nikaragvanoj estis trejnitaj ?i tie," diris Kolonelo-?eneralo Bayardo Ramón Rodríguez Ruiz, ?efo de la ?efa Stabo de la Nikaragva Armeo, dum akcepto en tiu ?i urbo flanke de Armekorpusa Generalo Roberto Legrá Sotolongo, Unua Vicministro de la Revoluciaj Armitaj Fortoj (FAR) de Kubo kaj estro de la ?efa Stabo, ?e la ma?zoleo El Cacahual.

En solena ceremonio okazinta ?e la ripozejo de la kubaj patriotoj de la sendependigaj militoj Le?tenanto-?eneralo Antonio Maceo kaj lia asistanto Panchito Gómez Toro, la Kolonelo-?eneralo Rodríguez Ruiz

deklaris, ke "per ?i tiu vizito ni montras al la mondo, ke ni konservas permanentajn ligojn de frateco kaj amikeco, kaj ke ni havas armitajn fortojn, kiuj ?iutage preparas sin por plenumi la sanktajn celojn etendi pacon kaj liberecon al niaj popoloj."

"Tial ni sentas nin profunde honoritaj, kaj esti ?i tie estas fonto de fiero," li rimarkigis.

Dum sia restado en Kubo, li vizitos lokojn de historia kaj kultura intereso, same kiel unuojn kaj entojn de la kubaj Armitaj Fortoj kun la celo reaserti la rilatojn inter la du nacioj.

?efoj kaj oficiroj de amba? landoj ?eestis la eventon, kaj kiel parto de la oma?o, la altranga milita oficisto metis florkronon honore al la herooj kaj martiroj de la kuba Revolucio.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/384719-kubo-kaj-nikaragvo-plifortigas-kunlaboron-pri-trejnigo-de-siaj-armitaj-fortoj

**Radio Habana Cuba**